


FAMo

unuakta teatraĵo unufoja



(LA DEKUnuA LOGO)

FAMo – unuakta teatraĵo unufoja

Kaŝinspiris.....Miguel Gutiérrez Adúriz
Scenejverkis.....Marcos Cruz
Preilustris..... Pedro Ullate
Prefotis.....Raúl Salinas
Revizium*s..... Antonio Valén
Aranĝigigis!..... Ana Manero
Vekompostis.... Marcos Cruz

© ĉe la regalito ĉar donace

Ĉu la dua *ret*Libro je Hispana Esperanto-Federacio?
info@esperanto-es.net
www.esperanto-es.net

Finfinita novembre 2003e la 23an

Kompostita kaj PDF-igita per la libera programo OpenOffice.org: openoffice.org

Multaj Esperanto-libroj PDF-formataj, iuj eble eĉ pli interesaj ol ĉi tiu, inter kiuj **LA DEKA LOGO**, troveblas ĉe la eLibrejo: esperanto.nu/eLibrejo

Grava noto por la ekstera publiko far la informfako de Hispana Esperanto-Federacio:

Se vi hazarde trovis ĉi tiun libreton kaj ŝatas ĝiajn bildojn sed malgraŭ dezirego tute ne povas ĝin legi ĉar vi eĉ ne scias en kiu lingvo ĝi estas verkita, esperinde vi komprenos almenaŭ ĉi tiujn plej simpl-eg-ajn helpajn frazojn inform-cel-ajn, krome propagand-em-e montr-ant-ajn la esprim-iv-eg-on de nia kara lingvo, kaj vi tuj ret-vizitos nian de-longe re-konstru-ad-at-an ret-paĝ-ar-on je www.esperanto-es.net. Ĉu do klare?!

Antaŭbonvenon al nia malferma komunumo! Espereble vi ankaŭ aniĝos, ĉar la afero evidente utilegas, vi ekvidas, kaj ni ĉiam bezonas freŝajn kotizantajn kunsklavojn.

(Notnoto: se ankaŭ ne la hispanan vi komprenas, vizitu esperanto.net)

FAMo unuakta teatraĵo unufoja

Roluloj laŭ aperordo

- Eble Suden SES, iomjaraĝa kaj lipharara
- Miguel GUTIÉRREZ ADÚRIZ, iomplijaraĝa sed simila
- HEF-prezidanto, iomjaraĝa sed malsama

Necesaĵoj

- Necesejo (por antaŭ kaj post la ludo)
- Longeta hararo (natura aŭ peruka)
- Liphararo (natura aŭ gluebla)
- Ĉemizo
- Kravato (bunta)
- Veŝto
- Longa pantalono, ŝuoj kaj subvestoj laŭ plaĉo
- Portebla komputilo (fortika)
- FAM-kandidatiĝiloj nefinitaj
- Du finitaj flugfoliaj FAM-kandidatiĝiloj
- Retbulteno
- T-ĉemizo M-mezura de blanka pura dorso
- Ĉi tiu teksto
- Teko por preskaŭ ĉion porti

Scenejo

Malplena. Nura tablo situas meze. La simpla dekoro ideale ebligus ludi ĉi tiun verkon dum Esperanto-kongresoj (se nur ĝi ne estus unufoja teatraĵo jam premierinta). Malpli laboremaj Esperanto-asocioj eĉ la tablon povus rezigni (avertende, tio devigus onin tamen laboradi por adapteti la tekston, do pli komforte peni tablon trovi kaj porti).

Premiero

Premiero okazis dum la 62a Hispana Esperanto-Kongreso en Valencio, la 19an de julio 2003a, kun neĉeestantaj aŭtoritatoj, far jenaj tiel nomataj aktoroj, laŭ alfabeto ordo:

- Miguel GUTIÉRREZ ADÚRIZ, spontane role de si mem, kvazaŭ ne temus pri li
- Miguel Ángel SANCHO, role de HEF-prezidanto, tio estas, li mem
- Eble Suden SES aŭ Marcos CRUZ, laŭ disponebleco kaj opinioj

Noto

La roluloj, ĉar aŭtoroj, rajtas dum ludo spontane kaj nature forgesi aŭ inventi teksterojn, des pli se la publiko ne legis la tekston por komparo. Tio fake nomiĝas sursceneja verkado, aŭ esprimlibero.

UNIKA SCENO

(Suden Ses surscenejiĝas. Li ĉiam dumlude absolute seriozu, senecese per malrigardo la gapajn malbelajn vizaĝojn de la publiko. Li venas apud la tablon, kaj sur ĝin metas sian porteblan komputilon.)

Mi preferas uzi mian propran komputilon. Mi ne ŝatas, ke miaj intimaj dokumentoj havu kontakton kun nekonataj maŝinoj. Krome mia estas tre fortika, ĝi bone tenas miajn paperojn.

(Li eltekigas ĉi tiun tekston kaj ĝin metas sur la malfermitan komputilon, por se post ekforgeso ne venus en la kapon sufiĉa esprimlibero.)

Mi scias, oni diris, ke ĉi tiaj maŝinoj havas multajn aliajn utilojn, sed mi, ĉar tre grava kaj okupita persono, ankoraŭ ne povis legi la manlibron. Dume mi uzas ĝin kiel papertenilon. Cetere mi ŝparas energion.

(Li foriĝas de la tablo kaj alparolas la publikon.)

Mia nomo estas, eble, Suden Ses, kaj mi tute ne ŝatas ŝercojn pri tio. Se serioze, ni komencu. Se malserioze, mi konsilas, vi iru al Infana Kongreseto. Vi havas tempon aniĝi kaj alveni Svedion.

(Li firme montras ien, tuj poste dubas.)

Nu, sen steloj mi ne bone orientiĝas, do mi ne certas, kien oni iru Svedion, sed vi povas demandi surstrate de iu ajn afabla policisto, kien alveni la Infanan Kongreseton en Svedio.

(Li firme montras samdirekte.)

Ĉu serioze? Do ni komencu.

Unue mi volas publike danki la organizantojn aŭ organizanton de ĉi tiu brileta, agrableta, komforteta kongreso, ankaŭ humila kaj negalaksia, pro la honoro kiun ili ricevis per tio, ke mi akceptis la inviton veni prezenti mian aferon.

Mi estas fondinto kaj prezidanto de ankoraŭ ne tre konata Esperanto-asocio, ĝuste nomata FAMo. Fondinto kaj prezidanto, mi diris, do vi povas imagi kian responson kaj gravulecon. Vi povas tion bedaŭrinde nur imagi, dum mi povas ĝui.

FAMo estas faka Esperanto-asocio en konsultaj rilatoj kun aliaj amikaj asocioj kiaj *Klingona Movado* kaj *Fanklubo de la Oka Pasaĝero*. Ili diris, ke ili sendos reprezentantojn. Mi tamen ne ekvidas ilin. Almenŭ la okan pasaĝeron mi facile devus ekvidi. Ĉiel ajn, kaze ke ili estas en la salono, mi salutos ilin:

(Li okulojn ferminte montras kapalte unu manplaton kun apartigita malgranda fingro kiu moviĝas laŭ ĉiu vorto.)

OMMM... OMMM...

Kompreneble mi uzis nian komunan lingvon, ankaŭ kiu havas akuzativon, vi eble rimarkis la finaĵon "MMM".

FAMo estas siglo por *Fan-Asoci' de Migueluc'* aŭ *Fan-Asoci' de Miguel'*, ĉar ambajn akceptas la Akademio. Nu, ne ĝuste la vorton "ambajn" la Akademio akceptas sed la du nomojn, vi komprenis. Cetere pri tio kion la Akademio akceptas ni simple forfajfas, eĉ ĝoje forpisas, ĉar ni ne estas en konsultaj rilatoj kun la Akademio. Do mi ne salutos ĝiajn eblajn reprezentantojn, des malpli en nia komuna lingvo, se entute tiu ekzistas.

Kio estas la celo de FAMo? Analoge al ĉiuj fakaj Esperanto-asocioj, nia celo estas duobla: unuflanke ni celas konigi Miguel-on al Esperantistoj, kaj aliflanke konigi Esperanton al Miguel.

Ni ankoraŭ ne decidis, kiun celon entrepreni unue. Pluas pri tio delonga debatado inter la diversaj frakcioj de nia asocio. Miaopinie, apriorie estus pli komforte unue konigi Esperanton al Miguel kaj nur poste konigi lin al esperantistoj, pro simpla komunik-efiko. Sensencus venigi lin al Esperantistoj, dum li ankoraŭ nenion kompreneblan povas elparoli.

Mi ne forgesu, mi portis flugfoliojn de FAMo por poste disdoni al interesitoj. Eble vi miras, sed neeviteble ĉe ankoraŭ malgrandaj asocioj, eĉ fondinto kaj prezidanto devas foje iom labori pri ĉi tiaj aferacoj.

Pro tempomanko ne ĉiuj flugfolioj estas finitaj, sed feliĉe ili estas preskaŭ same uzeblaj. Jen kelkaj ne tute finitaj flugfolioj.

(Li prenas el la teko kaj montras nefalditajn FAM-kandidatiĝilojn.)

Ĉi tiuj du ekzempleroj estas ja definitive finitaj. Vi vidas, estas du malsamaj versioj.

(Li prenas el la teko kaj montras du malsamstilajn paperaviadilojn el la samaj informiloj.)

Estas klare, nia asocio estas plej kohera kaj moderna, ĉar niaj flugfolioj efektive flugas. Tio, krom impresi, ebligas tre komfortan propagandon.

(Li flugigas ilin.)

Kion faras FAMo por atingi siajn celojn? Ĝis nun du gravajn agadojn ni entreprenis, du gravajn projektojn ni realigis. Ne pri proponoj nek revoj nek ideoj mi parolas sed pri vere efektive realigitaj agadoj: Ni eldonis T-ĉemizon kaj retbultenon.

Ne temas pri simpla eldonado de T-ĉemizo kaj simpla eldonado de retbulteno. Tute ne.

Ni organizis ege inteligentan kaj lerte plenumitan kampanjon, ke ĉiu ricevanto de nia retbulteno ricevu ankaŭ kaj samtempe unu T-ĉemizon de nia asocio, eble ne retroŝte, tion ni ankoraŭ priprovas. Tiel nia asocio disponigos al ĉiu sia ano ambajn rimedojn, informan kaj propagandan, por efektiviĝi la celojn de FAMo.

Eksterordinara atingo kiun ni realigis, per apogo kaj subteno de ĉiuj membroj unuanime. Krome kaj feliĉe, kostoj estis ne tre... ne tre...

kiel oni diru lastatempe? ...daraj? Pli bone per natura Esperanto, mi celas: la kostoj signifis ne tre grandan kvanton da necesa mono pagenda, pli klare, ĉu? Al tiu malmultekosteco precipe kontribuis la fakto, ke ĝis nun mi estas la nura membro. Tio krome tre simpligis la distribuadon.

Jen la FAMa T-ĉemizo, mi montru nun.

(Li elprenas ĝin faldita el la teko, kaj tia ĝin montretas.)

Bela, ĉu?

(Li ekas remeti en la tekon sed haltas.)

Mi tamen escepte montru iom pli detale.

(Li malfaldas ĝin kaj montras la blankan dorson.)

Vi povas nun vidi ĝin tuta. Efektive la dorsan flankon ni elektis pure blanka, por intence montri la purecon de niaj celoj. Kion plian mi diru?

(Li legas la T-ĉemizan etiketon.)

Mezuro estas "M". Certa frakcio de nia asocio opinias, ke "M" signifas "mezgranda"; alia frakcio opinias, ke "M" signifas "mia", dum alia frakcio opinias alion.

Mi klarigu, la brusta antaŭa flanko temas pri la bela origino de nia asocio antaŭ dek kvin jaroj, vi vidos. Nu, vi vidos, mi celas, se vi aniĝos kaj kotizos, kompreneble.

(Li faldas la T-ĉemizon kaj ĝin lasas sur la tablon.)

Kaj jen la FAMa retbulteno, kies unua kaj unika provnumero ĵus aperis.

(Li eltekigas retsakon el kiu li prenas grandan libron.)

Ni nomas ĝin retbulteno car ĝi iom delikatas, kaj ni preferas porti ĝin per reto.

(Li solene la libron fermitan montras de ĉiu flanko, sed evitas montri la titolon.)

Nun mi volas anonci ion gravan, freŝan novaĵon:

Nia tuta asocio eksterordinare kunsidis pasintan nokton por fine decidi, post longa debatado ĝis frumateno inter la diversaj frakcioj, profiti ĉi tiun solenan okazon por delonge planita intenco de la tuta membraro, nomumi Miguel-on honora membro de FAMo, je rabatita kotizo.

Eĉ ne nur tio! Same profitante ĉi emociplenan eventon, kaj malavare kontraŭ nuraj preskostoj kaj sendkostoj, nia asocio oficiale transdonos la tutan stokon de T-ĉemizoj kaj retbultenoj al Miguel.

(Miguel naive kaj ĝoje venas el inter la publiko. Suden Ses donas al li la "retbultenon", tio estas, la unikan paperan version de la omaĝlibro *La Deko Logo*. Li montras ĝin al la publiko, kiu mire gapas. Suden Ses donas al li la T-ĉemizon. Ĝia bildo estas paĝo el revuo kie antaŭ dek kvin jaroj aperis anonceto pri la apero de la libro *Sferoj 5* pro kiu la aŭtoro de ĉi teatraĵo eksciis pri Esperanto kaj kontaktis lin. Miguel balbutas «...tio estas tro...»; Suden Ses al la publiko klarigas la aferon, montras la T-ĉemizon kaj legas la anonceton kie aperis la adreso de Miguel. Poste Miguel ekploretas kaj balbutas «...kion mi sentas kiam junuloj, iuj troviĝas ĉi tie, diras al mi, ke ili lernis Esperanton per miaj libroj...», sed ŝajne neniu atentis lin pro la emociega etoso. Aperas la HEF-prezidanto kun galaksia omaĝoplatto, samtempe montrata videoekrane, kiun li transdonas al Miguel post brakumo. «...mi ne meritas ĉi tion...», sed plu neniu atentis lin. Ĉiuj stariĝas kaj aplaŭdadas longege kaj brue kaj Miguel plendas je eklarmo, «*Diable, homoj, kion mi faru nun!*», sed neniu atentis lin...)

Cetere, nia retbulteno havas blankajn paĝojn por spontanaj skribaĵoj de la amantaj homamasoj. Ĉiu deziranto gravuru siajn vortojn poreterne!

NEFINO



en **COMIX INTERNACIONAL, ADIGSO** y **EL REYES**. Ahora son los propios Humanoides quienes acaban de lanzar en las Galias el álbum **"De-main les Dauphins"**, una muy libre traducción de "Fragmentos de la enciclopedia bélica", primera serie larga de **Primo** prepublicada por capillitas en la revista de **Toutain "1984"** hace ya unos cinco años. ◀

PARA AFICIONADOS AL ESPERANTO

El esperanto nació con la intención de convertirse en un idioma multiracial que rompiera las barreras comunicacionales que separan a los países. El tiempo, y otros intereses privados, lo han dejado como una jirafa a la que muy pocos se acercan. De todas formas, el Grupo Niño, de Santander, acaba de editar el n.º 5 de **SFEROS**, donde publica varios cuentos de ciencia ficción traducidos al esperanto, de autores como **NAOMI MITROSKIN**, **JOHANN RYSS** o **ELIA BARCELA**. La dirección, por si alguien siente curiosidad, es: **C/ Florenes, 5/7 2º C. 39010 Santander**. ◀

EL ESPERADO REGRESO DE "VALERIAN"

El "agente espacio temporal" creado por **PIERRE CHRISTO** y **J.C. MEZENS** vuelve al primer plano de la actualidad con **"Sur les frontières"**, su último álbum.
Valerian y Laurene se sumergen de nuevo en una obra de ciencia ficción a la que sus autores han sabido dotar de un interés excepcional, tanto por los guiones con continuas referencias políticas a la actualidad de **Christo**, como por la excelente composición gráfica del inspirado **Mezens**. Dargaud acaba de editar este álbum en Francia y Bélgica. Esperemos que Orjabe no tarde en hacer lo mismo en nuestro país. ◀



NUEVO ALBUM DE ROSINSKI EN FRANCIA Y BELGICA

Nuestros lectores ya conocen el "savoir faire" del polaco **Rosinski**, un profesional emigrado a Bélgica que es actualmente el responsable gráfico de **"THORGAL"** y **"EL GRAN PODER DEL CHINKEL"**. En 1983, y por encargo de la editorial belga **Lombard**, **Rosinski** se une profesionalmente a **Duchetiau** y nace **"HANS"**, una serie ambientada en el año 2061, en una Tierra devastada por el "gran cataclismo": **"Les gladiateurs"** es el cuarto álbum de este personaje. ◀



Uno de los protagonistas de "Chickie", de los hermanos Rosinski.

MOEBIUS: TRILOGÍA EN "DO" MAYOR

En los Angeles o en Haití, diseñando escenas para un film o ilustrando cubiertas de libros, confeccionando carteles o realizando cómics... Todas las tareas de este platin son dominadas por **Moebius**, un **AUTDR** (así, en neologismos) que consigue música de altura audible para todos los gustos.

Mientras espera la oportunidad de convertirse (quién sabe?) en director de cine o ministro de cultura francés, el ingenio creativo de esta ya cuarentón artista sigue pateándose en todo medio relacionado con la imagen.


El pasado mes de septiembre **Moebius** ha sido noticia por partida triple en Francia y Bélgica debido a la edición por parte de **Castelmann** de tres álbumes escritos y dibujados por su insigne talento: **"Fueur de monde"**, **"Les jardins d'Edena"** y **"Made in L.A."**.

Hace aproximadamente un par de años los aficionados al arte del creador de "Arzach" pudieron rescatar los bellos con la edición de un libro y cartón de parafolio titulado "Fueur de monde". Ahora **Castelmann**, respetando el mismo título, ha confeccionado un libro con lomo de tela en la que esta pequeña y curiosa historia respica nuevos aires. A viñeta por página y con un pequeño texto en la parte inferior, este pequeño libro (26 x 20 cms.) se convierte en una rara pieza de coleccionista.

Acaba de finalizar su serialización en **(A SAVVRE)** y los lectores de **CAND** están disfrutándola en estos momentos. Se trata de **"Les jardins d'Edena"**, una historia de 51 páginas donde **Moebius** confecciona una pequeña apología de la instintoterapia, nueva técnica alternativa que profetiza la ingestión de alimentos en su estado más puro posible: o sea, crudos. La línea sencilla y el dominio del color vuelven a ponerse de manifiesto en un trabajo muy distinto del realizado en la serie de **"JOHN DIFDOL"**. **"Los jardines de Edena"** es la segunda parte de la historia **"Sobre la estrella"**.

"Made in L.A." es otro bello libro que recoge diversos trabajos de **Moebius** que van desde cartones publicitarios hasta ilustraciones para cubiertas de libros editados en Norteamérica. En realidad, y tal y como deja ver su diseño de portada, este libro pertenece a la colección iniciada por **Aedena** antes de su desaparición, colección en la que se publicaron **"Venecia Celeste"** y **"Strawatcher"**.

Para el año próximo está prevista la edición en **Norma Editorial** de los dos últimos álbumes de los que se habla en este artículo **A.C.**



Paĝo el "CIMOC" n-ro 92 (1988).
Dankon, Miguel!

PARA AFICIONADOS AL ESPERANTO

► El esperanto nació con la intención de convertirse en un idioma multirracial que rompiera las barreras comunicacionales que separan a los países. El tiempo, y otros intereses privados, lo han dejado como una rareza a la que muy pocos se acercan. De todas formas, el *Grupo Nifo*, de Santander, acaba de editar el n.º 5 de **SFEROS**, donde publica varios cuentos de ciencia ficción traducidos al esperanto, de autores como **NAOMI MITCHSON**, **JOANNA RUSS** o **ELIA BARCELÓ**. La dirección, por si alguien siente curiosidad, es: *C/ Floranes, 57 2º C, 39010 Santander*. ◀



Kandidatiĝ' por FAM' (Fan-Asoci' de Migueluc')

KT-jar' 2003a

Identigiloj de l' kandidat'

Voknom'	
Klannom'	
Loĝlok'	
Kosmkod' kaj planed'	
Cerbkontakttilnumer'	
Menspoŝta adres'	
Kosmtempa koncipdat'	

Kategori'

Ĉiuj anoj ricevas ĉiujn niajn jenajn kompletajn inform- kaj propagand-servojn, sendepende de kategori':

1. Nian unikan retbultenon dikan.
2. Nian unikan T-ĉemizon belan.

Niaj servoj estas vere unikaj, do laŭvice pruntataj por du-tri kosmtempaj tagoj al ĉiu an' annumerorde sen escept'.

Kategori'	Kotiz' (stela)
VG vulgara	100'00
VG' vulgara mezaĝul'	99'95
BG bulgara (nur por bulgaroj el Bulgari', Ter')	100'00
VK vulkana dara	1 000'00

Pagmanier'

Surloke. Surtere. Surprize. Ial aliie.

Kromnom'

Por familiaraj inter-konatiĝ' kaj -kontentiĝ', niaj anoj uzu kromnomon, elektotan el jena list'. Kromnomkombinoj estos oficiale donitaj laŭ petord' kaj konvena ceremoni'. Elektu vian preferatan kromnomon:

Kromnoma voknom'	Kromnoma klannom'
<input type="checkbox"/> Suden. <input type="checkbox"/> Norden. <input type="checkbox"/> Dekstren. <input type="checkbox"/> Enen.	<input type="checkbox"/> Ses. <input type="checkbox"/> Sep.
<input type="checkbox"/> Foren. <input type="checkbox"/> Transen. <input type="checkbox"/> Suben. <input type="checkbox"/> Suren.	<input type="checkbox"/> Dek. <input type="checkbox"/> Cent.
<input type="checkbox"/> Traen. <input type="checkbox"/> Disen. <input type="checkbox"/> Ien. <input type="checkbox"/> Alen. <input type="checkbox"/> Tien.	

Pet' kaj promes'

Mi solene, humile kaj ĝoje petas aniĝon en FAMon kaj firme promesas obei kaj obeigi ties statuton, kosmtempe-iam verse verkotan.

Kosmtempa moment' =

Cifereca subskrib' =

Sendu ĉi kandidatiĝon al Los Coteros 1-C 2-I, ES-39600 Muriedas (Tero) aŭ al retroŝto liven@wanadoo.es (menspoŝto dume ne funkcias, *kulp* kompanio *Cerbefónica*). Espereble kaj kosmtemp-ekoktobre nian unikan retbultenon "La deka logo" vi povos trovi en la [eLibrej'](http://esperanto.nu/elibrejo/) (esperanto.nu/elibrejo/).

Al Miguel Gutiérrez Adúriz, Liven Dek,
admirinda ĉiam ĉie, ankaŭ ali-dimensie.

